748 PREFECTURE D'ALGER
DEPOT LÉGAL

1re Année — 20 Octobre 1905 — N° 14

5 Centimes — LA — 5 Centimoj

ALĜERIA STELO

L'ÉTOILE ALGÉRIENNE

Petit Organe de Propagande Espérantiste de l'Afrique du Nord

BI-MENSUEL ★★★ DUONMONATA

Prix de l'Abonnement annuel		Kosto de la Jara Abono	
Algérie, Tunisie	2 fr. »	Alĝerujo, Tunisujo	2 fr. »
France	2 fr. 50	Francujo	2 fr. 50
Etranger	3 fr. »	Eksterfrancaj landoj	3 fr. »

Les Annonces sont reçues à l'Administration du Journal, 57, rue d'Isly, ALGER. *Prix sur demande*

DIRECTEUR-FONDATEUR **Barthélemy BALS**
ADMINISTRATEUR **Louis LANDES**

La Anoncoj estas ricevataj al la Administracio de la Jurnalo, 57, rue d'Isly, ALGER. *Prezoj laŭ peto*

ESPERANTO EBLIGAS AMIKECON INTER PLEJ MALPROKSIMITAJ HOMOJ

GROUPE ESPÉRANTISTE D'ALGER

ET DE L'AFRIQUE DU NORD

Le Comité a l'honneur d'informer le public que les cours d'esperanto auront lieu, à partir du 23 octobre courant, les lundi et vendredi de chaque semaine, à huit heures et quart du soir, dans le salon de lecture du Comité d'Hivernage, rue Combes.

Lundi, cours supérieur. Vendredi, cours élémentaire.

Ces cours sont gratuits pour les membres du Groupe. Les autres personnes qui voudront y assister devront payer un droit d'inscription de un faanc.

Adresser les demandes d'inscription au siège social, 8, rue Ledru-Rollin, Alger.

Monoferoj por la Kalabriaj Mizeruloj

« La Alĝeria Stelo », 5 fr. — Grupo Esperantista de Alĝero, 10 fr. — Doktoro Bresson, 5 fr. — Sinjorino Roux, 2 fr. 50 — Sinjoro Roux, 2 fr. 50. — Sinjoro Aubert, 5 fr. — Sinjorino Moinard, 2 fr. 50. — Sinjoro Moinard, 2 fr. 50. — Sinjoro Foussat, 1 fr. — Sinjoro Boulanger (Louis), 1 fr. — SUMO : 37 frankoj.

Letero de D-ro Zamenhof al S-ro Schneeber

PRI LA DUA UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO EN SVISUJO 1906

KARA SINJORO !

Kun granda plezuro mi legis en via letero, ke la svisaj esperantistoj decidis inviti la duan kongreson en Svisujon. Tre bone, bonege ! Svisujo, kiu, ne havante ian nacian lingvon, estas la plej neŭtrala lando en la tuta Eŭropo, estas la plej bona loko por kongreso neŭtrale-homa, kaj mi esperas, ke tie ĉiuj esperantistoj sentos sin bonege. Mi eĉ antaŭvidas. ke venos jam la tempo, kiam Svisujo fariĝos la natura konstanta centro de la tuta esperantistaro.

Mi persone ne povas nun decidi, ĉar la decidado pri la kongreso apartenas nun al la « Komitato de Organizado » elektita en la unua kongreso ; sed mi esperas, ke la Komitato nenion havos kontraŭ Svisujo kaj akceptos la inviton de la Svisoj kun plej granda plezuro kaj danko.

Mi esperas, ke la svisaj Esperantistoj faros ĉion. kion ili povas. por bonege prepari la kongreson kaj fari el ĝi imponantan grandiozan manifestacion de inter-popola frateco, grandan feston, en kiu, krom la esperantistoj portoprenos, ankaŭ miloj da neesperantistoj, kiuj venos kiel gastoj serĉantaj impreson kaj foriros entuziasmigitaj kaj esperantigitaj. Mi esperas, ke la svisaj esperantistoj nun ofte kunvenados kaj korespondados inter si, por pretigi ĉion kiel eble plej bone, plej majeste kaj plej frue.

Kompreneble, la svisaj esperantistoj devas agadi en plena interkonsento kun la « Provizora Komitato de Organizado ». Ili devas ankaŭ peti konsiloj de S-ro Michaux, kiu havas jam kelkan sperton.

Ĉar la plej grava celo de niaj kongresoj estas la **propagando**, tial laŭ mia opinio la afero nepre devas esti aranĝita tiamaniere, ke en ĉiuj kunvenoj kaj solenoj, krom la esperantistoj, povu partopreni ankaŭ kiel eble plej multe da **ne**-esperantistoj (kompreneble, ne kiel membroj de nia familio, sed nur kiel

gastoj, por difinita pago). Por tio oni devus kiel eble plej frutempe veki la intereson da la tuta mondo por nia kongreso per lerte kaj alloge verkitaj gazetaj artikoloj, pri kiuj, kredeble, zorgos la « Provizora Komitato de Organizado ». La Komitato, kompreneble ne devas forgesi dissendi, kiel eble plej frutempe, inviton al ĉiuj plej gravaj gazetoj de la mondo kaj ripeti tiun inviton (eble kun peto pri definitiva respondo) ses-ok semajnojn antaŭ la kongreso.

Se min ne malhelpos iaj nevenkeblaj cirkonstancoj, mi penos nepre veni al la kongreso, ĉar mi intencas prezenti al la kongreso aferon tre gravan, kiu estas la plej necesa plenigo de la afero esperanta kaj pri kiu mi revis kaj laboris en la daŭro de mia tuta vivo, sed kiun mi ne volis prezenti antaŭ ol ĝi estis tute matura, por ke vi tamen ne timu, ke la propono de grava afero ne povus elvoki dangeran disputadon, mi trankviligas vin, ke tiu propono ne estas **ligita** kun la esperantismo, sed estas nur ĝia sendependa **parenco** ; ni sekve ne bezonas voĉdonadi pri ĝia akceptado aŭ malakceptado, sed simple la malaprobantoj de la propono ne aliĝos al ĝi kaj la aprobantoj kreos apartan, por neniu devigan esperantistan **partion**, simile, ekzemple, al la partio de esperantoj-pacifistoj aŭ aliaj

Kun kora saluto.

Varsovio, 2-X-05. Via : ZAMENHOF.

GROUPE MÉDICAL ESPERANTISTE DE FRANCE

Président : Professeur CH. BOUCHARD, Membre de l'Institut.

Le « Groupe médical », ayant pour but de propager l'usage de l'Esperanto dans les milieux médicaux internationaux, a compris qu'il était impossible d'arriver à un résultat quelconque dans cette voie sans posséder un « Vocabulaire des termes techniques » afférents aux sciences médicales.

La première chose à faire était donc de créer le langage anatomique, sans lequel il est impossible d'écrire quoi que ce soit sur un sujet médical.

Une très grande difficulté s'est présentée tout d'abord, c'est la multiplicité des dénominations, qui servent à désigner un même organe et parmi lesquels il faut en choisir une qui devra être internationale. En ce qui concerne la terminologie adoptée par les peuples latins, cela est presque impossible.

Les peuples germains ont depuis longtemps compris l'inconvénient des synonymies multiples et ils sont arrivés à uniformiser leur langage anatomique. En 1895, s'est réuni à Bâle un congrès d'anatomiste, qui a élaboré une nomenclature en latin, laquelle est depuis lors en usage chez tous les peuples germains, soit de race, soit d'influence, sous le nom de « Nomenclature de Bâle. ».

Aussi, se trouvant en présence de cette Nomenclature latine, acceptée par près de la moitié de l'Europe, le « Groupe médical » a pensé que ce qu'il y a de mieux à faire était de l'adopter et de s'en servir comme base de la terminologie espérantiste. Les peuples latins n'auront donc aucune difficulté pour s'assimiler les expressions latines de la Nomenclature de Bâle et par suite pour parler le même langage anatomique que les peuples germains. De cette façon, grâce à l'Esperanto, le langage anatomique sera absolument internationalisé et ce sera ainsi la meilleure démonstration des services que peut rendre une langue internationale.

Le vocabulaire sera édité en trois langues ; latin, français, esperanto. Il comportera deux parties : l'une alphabétique contenant les termes latins qui correspondent littéralement aux termes français ; l'autre analytique, divisée d'après les grandes subdivisions anatomiques : Ostéologie, Arthrologie, etc., renfermant les termes anatomiques latins, dont la traduction littérale diffère complètement du terme anatomique français. Exemple :

"Fossa romboida", plancher du quatrième ventricule. "Acetabulum", cavité cotyloïde ; de sorte que lorsque l'on voudra traduire une expression anatomique, par exemple : "cavité cotyloïde", on cherchera d'abord dans la partie analytique et l'on trouvera le correspondant latin "Acetabulum" et le correspondant esperants "Acetabulo". Si, au contraire, l'on voudrait traduire : troisième ventricule, on chercherait à la Neurologie et l'on ne trouverait pas l'expression. Dans ce cas, cela voudrait dire que l'expression française correspond littéralement à la latine, et l'on n'aurait alors qu'à chercher chaque mot formant l'expression dans le dictionnaire alphabétique. Dans l'exemple précédent, on traduirait donc : "tria ventriklo".

Nous avons dû adopter ce plan pour diminuer les frais d'édition qui sont très lourds.

L'élaboration de ce Vocabulaire a demandé, de la part du « Groupe médical », un travail considérable et sa publication entraînera des frais élevés.

Comme il est du plus haut intérêt au point de l'adoption future d'une langue internationale, qu'un vocabulaire technique de cette importance soit édité en librairie, nous espérons que tous ceux qui s'intéressent à cette grande question, voudront bien nous apporter leur concours pécuniaire, en souscrivant un ou plusieurs exemplaires de l'ouvrage.

DIAB'O KAJ LA BELA DĴAZIA'O

ARABA LEGENDO

(Daŭrigo)

II

Ŝi admonis siajn kunulinojn, ĉiuj filinoj de granda tendo, por ke ĉiu petu al siaj gepatroj unu kamelinon por doni al Diab'o ben Ghanem'o, kompense de la ŝafinoj ke, tiel kavalire, li estis oferdonintaj al ili, kvankam nur el tio konsistis lia havo. Tiele estis farita ; ĉiu junulino donacis unu kamelinon kaj Dĵazia'o donis unu kamelon.

Diab'o daŭrigis gardi siajn kamelajn bestojn; kiel iam li gardis sian ŝafaron. Ĉirkaŭe unu jaron poste, foje kiam li estis ilin kondukintaj sur paŝtejon, li ekvidis alvenante lin du ĉevalidinojn mane kondukatajn de ia homo. Unu el ili blankkolora ekruliĝis teren kaj ekreleviĝis tiel rapide ke ĝi tute ne tiris sian kolbridon, tiapunkte ke ĝia kondukanto ne ekvidis tiun agadon. Tuje Diab'o komprenis ke tia besto devenis de tutpura raso kaj sekve ĝi estis rapidegironta. Li demandis al la homo, kiu estas Hebreo, kion tiu ĉi volas, interŝanĝe por sia blanka ĉevalidino. La homo respondis : « Donu vian tutan brutaron. » Diab'o protestegis kaj post longa disputado la Hebreo akceptis ok kamelojn kaj donis la ĉevalidinon.

De tiu tempo Diab'o ben Ghanem'o ĉiam kondukis siajn bestojn kun sia blanka ĉevalidino, kiun li nutris anstataŭ per hordeo, per la lakto de siaj kamelinoj Tri aŭ kvar jaroj tiele pasis kaj la blanka ĉevalidino iĝis belan ĉevalinon. Samtempe la brutaro de Diab'o estis plimultiĝinta kaj li, iom riĉiĝinte lasas sian kamelaron gardatan de paŝtisto. Li pasigis sian tempo ĉasadante. Poste li partoprenis al razia'oj (rabadoj) faritaj de lia partianaro kontraŭ la najbaraj popoloj, kaj baldaŭ lia famo pri kuraĝo kaj braveco disvastigis malproksimen tra la tuta lando.

Samepoke Hebreo riĉa komercisto kiu trairis la regionon pro sia komercado sciiĝis pri la mirinda beleco de la bela Dĵazia'o. Nu, ĉar li ne povis demandi ŝin pri edziĝo, li ekintencis ŝin forrabi. Por atingi tiun celon li alvenis la Dĵazia'an duaron (tendaron) rajdante sur ĉevalo tiel vivega kaj rapidiranta ke li kredis ke simila ne ekzistas.

Alveninte apud la tendoj li demandis kiel kutime : « Kiu deziras aĉeti juvelojn, orajn kaj arĝentajn ĉirkaŭbrakojn ? » Dĵazia'o aŭdis lin kaj sendis unu el siaj servistinoj por elekti du orajn ĉirkaŭbrakojn. La virino alpaŝis la vendiston, kiu, demandinte el kiu ŝi venis, al ŝi remetis la du juvelojn por ŝia mastrino.

Ilin vidante, Dĵazia'o tre ŝatis ilin, sed baldaŭ ilin resendis pro ilia tro granda amplekso. La vendisto remetis du aliajn, sambelegajn kiel la unuaj sed ili estis tro malgrandaj. Tiam la Hebreo diris al la servistino, kiam ilin ŝi realportis : « Petu vian mastrinon ke ŝi mem venu por ke ŝi provu aliajn. Vidante ŝian brakon, tuj mi elektos kion estas konvena. »

Dĵazia'o prisciigita de sia servistino, eliris el sia tendo kaj alvenis la fremdulon, kiu estis restinta sur sia ĉevalo. « Kial vi ne altereniĝas ? » ŝi diris. Li respondis : « Ne havante multe da tempo, tre baldaŭ mi foriros, kaj mia komercaĵo ne estas embarasa. Mi estas vizitonta aliajn duarojn; rapide provu la juvelojn kaj tuj mi foriros. » Dĵazia'o alproksimiĝis nemalfide, sed dum ŝi antaŭiĝis siajn manradikojn por ilin mezurigi, la Hebreo subite ekkaptis la junilinon, ŝin altiris al si, kaj perforte sidiginte ŝin sur sian selon, galopegante li ekforkuris.

La duaranoj vidinte tiun rapidegan kaj maltimegan forrabon kaj ne havinte tempon por kontraŭstari al ĝi, tuj eksaltis sur siajn ĉevalojn kaj ekpersekutis la rabiston, alvokante kunhelpon de la najbaraj duaranoj.

Tiun tagon, Diab'o ben Ghanem'o estis foririnta matene por ĉasadi kun du el siaj amikoj, Zid'o kaj Buzid'o. La ĉasantoj estis mortigintaj gazelon kaj estis haltintaj por kuiri pecon da ĝi. Apude staris iliaj ĉevaloj maĉante siajn enbuŝaĵojn ankoraŭ blankajn per ŝaŭmo. Subite, la blanka Diab'a ĉevalino levis sian kapon, starigis siajn orelojn kaj longe blekis. Diab'o ekkriis :

La blanka ĉevalino blekas, malfeliĉaĵo okazas
Aŭ nia gento estas raziaita, aŭ Dĵazia'o forrabata estas.

(Daŭrigota)

A. BAISSAC.

Legantoj ! Varbu al ni KVIN abonantojn kaj vi estos enskribota kiel proktektanta abonanto al la « Alĝeria Stelo ».

Ni ankoraŭ sendos sesan senpagan abonon al kiu ajn persono kies nomo kaj adreso estos senditaj al ni.

VOJAĜO ĈE OKCIDENTAFRIKAJ BORDOJ

Speciale Esperantigita por « Alĝeria Stelo »

UNUA PARTO

FORIRO EL MARSILIO ✣ ORANO ✣ LAS PALMAS ✣ DAKAR (Senegalo)
ALVENO AL KONAKRY (Franca Ginzo) ✣ ✣ ✣ ✣ ✣ ✣ ✣ ✣ ✣ ✣ ✣

— (Sekvo) —

Kun kelkaj kunvojaĝantoj mi elŝipis, kaj tuj kiam ni alvenis la bordmarŝejon, nubego da veturkondukistoj ĉirkaŭiĝis nin por proponi siajn veturilojn por iri urbon, kiu estas malproksima ĉirkaŭ tri kilometrojn de la haveno.

Ni amasigiĝis ĉiujn en malgranda veturilo, kiu rapide alkondukis nin ĝis la placo, kie ni eniris hotelon de « Kvar Nacioj », ĉefhotelon el Las Palmas.

La urbo estas sufiĉe vasta, kaj la konstruaĵoj montras arhitekturon, parte hispanan, parte araban : malaltajn kaj blankajn domojn kun fenestroj provizataj da kradoj kaj da arabeskoj, la tagmentoj formas terasojn kaj la fasadoj estas unuforme plataj kaj sen ornamoj ; male, la publikaj placoj estas belegaj kaj havas sufiĉegan plantadon da bananujoj, palmarboj, k. t. p., je denta foliaro. La katedra preĝejo estas vera hispana arhitekturo, kaj belega, tiel ekstere kiel interne, kaj enhavas grandajn riĉecojn ; kontraŭ la ĉefpordego troviĝas grandega placo, ĉirkaŭita per feraj balustradoj, kaj ĉe la eniro kuŝas du bronzaj statuoj, kiuj prezentas belajn huntojn ; la placo, longa ĉirkaŭ cent metrojn, etendiĝas ĝis la Museo, kiu kuŝas kontraŭ la preĝejo.

Tiu ĉi Museo, oni diris al mi, estas tre rimarkinda kaj enhavas riĉaĵn kaj belegajn kolektojn da pentraĵoj, malfeliĉe la tempo ne permesis al ni viziti ĝin Ni pasis torenton, tute sen akvo, kaj eniris alian kvartalon de l' urbo, ĉe kiu ni admiris belegajn plantadojn da bananujoj, kiuj supreniras ĝis la pinto de monteto, kiu kuŝas malantaŭ la urbo : belegan vidaĵon prezentas ĉiuj arboj je larĝaj malpalaj verdaj folioj, inter kiuj longaj masoj da bananoj de bela orkoloro oni ekvidas ; la profito, kiun havigas tiuj bananaroj estas tre grava utilo por la posedantoj.

Revenante, ni vidis la fortikaĵo, kaj proksime ni ankaŭ vidis loĝejojn kavigitajn en viva ŝtonego, ĉe kiuj loĝas tre miksita loĝantaro : jen estas, precipe, migrantutoj, vivantaj per la vendo de aferoj, kiujn ili fabrikas ĉe siaj primitivaj loĝejoj, ekzemple, korboj, hispanaj ventumiloj, kanoj kaj bastonoj, kurioze skulptitaj, k. t. p. ; fine, ni revenis vaporŝipon je la 7-an horon vespere, kaj je la 9-an ni foriris. Nun ni haltos nur ĉe Dakar (Senegalo), kie la ŝipo restos unu tutan tagon.

De Las Palmas al Dakar, la morvojaĝo estis la plej agrabla parto de nia tuta vojaĝo.

(Daŭrigota).

GRAFO ALBERT GALLOIS,
Membro de la Grupo de Alĝero kaj de la Nordafriko.

ACÉTYLÈNE Carbure de Calcium **T. GIRIAT** 66, rue Sadi-Carnot ALGER-MUSTAPHA — Téléphone —

GRAFO GALLOIS, en Riolunato (provinco de Modena) ITALUJO, deziras ricevi malnovajn poŝtmarkojn el ĉiuj landoj. Li sendos, interŝange, ĉiujn italajn poŝtmarkojn malnovajn kaj nunajn.

L'INSIGNE espérantiste **Etoile Verte** d'Emile **GASSE** **INTERNATIONAL**
est en vente dans nos bureaux, 57, rue d'Isly, Alger, au prix de **1** franc ; par poste recommandé, **1** fr. **15.**
Tous les Espérantistes doivent avoir l'**Etoile Verte.**

BONEGA OLIVOLEO EL " PROVENCE "
KAFOJ. - TEOJ. - ORANĜFLORAKVOJ. - PURA SAPO
Firmmarko : **L'Esperanto**
Petu prezarojn, specimenojn. — Speciala rabato al Esperantistoj por ĉiuj senperaj mendoj. — Agentoj akceptataj en ĉiuj landoj. — Skribu : A-te LANISSON, Salon (B.-du-Rhône) Franclando.
Por la Alĝeraj mendo turnu vin al. S-ro Louis LANDES, 57, rue d'Isly, Alger

Le Gérant : MICHEL LLEDO. Alger. — Imp. J. TORRENT, 57, rue d'Isly.

Lettres accentuées de la Maison TURLOT, CHAIX et Cie, 128, rue de Rennes, Paris

Michel Lledo